Cena sešitu (s lit. přílohou) 30 hal.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

s literární přílohou

„Legolibro de bohemaj Esperantistoj"

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.).

Prezid.: Jan Hradil. Vicprezid.: Karel Procházka. Sekr.: Ot. Davídek. F. K. Svačina. Kas.: K. Kopecký. (Praha I., 342. Kavárna „Union".)

B. U. E. sdružuje spolky esperantské v těchto **27** místech:
B. U. E. unuigas sekvantajn **27** esperantajn societojn:

PRAHA (klub)
PRAHA (Asocio, ligo)
PRAHA VIII.
PRAHA (akad. klubo)
PRAHA (stud. rondeto)
KRÁL. VINOHRADY
ŽIŽKOV
PLZEŇ (klub)
PLZEŇ (laborista klubo)
Č. BUDĚJOVICE
HRADEC KRÁLOVÉ
KUKLENY
PRASKAČKA
OSEK U ROKYCAN
PROSEK
MLADÁ BOLESLAV
TRUTNOV
MINICE
LIBEREC
PÍSEK
HOSTOMICE
JAROMĚŘ
PARDUBICE
KLATOVY
KARDAŠOVA ŘEČICE
NEBAHOV-PRACHATICE
HOŘOVICE.

OBSAH — ENHAVO:

1909 **BŘEZEN. — MARTO.** III. 3.

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

Časopis Českých Esperantistů

s literární přílohou

„Legolibro de Bohemaj Esperantistoj“

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně 3 K pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů“, Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (Fr. 3·75 = 1,50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata nur laŭ la adreso:

„Časopis Českých Esperantistů“ en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskriptojn por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj estos ĉiam prefere akceptitaj.

Účet poštovní spořitelny 93.281.

*** ***

PARTO OFICIALA

enhavas artikolojn, avizojn k. t. p. de B. U. E., kies komitato redaktas ĉi tiun rubrikon. Demandojn kaj informojn adresu: „Bohema UNIO Esperantista“ (Al sekretario s-o Ot. Davídek) Praha I.—342. Esperanto-Kafejo „Union“ Ferdinandova tř. 29.

ÚSTŘEDNÍ SVAZ ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

CENTRA ASOCIO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

B. U. E.

RAPORTO PRI ĜENERALA KUNVENO okazinta la 14. de marto en kafejo „Union“:

Ĉeestis 22 delegitoj, kiuj reprezentis 14 societojn (el la 26 grupigitaj) kaj sama nombro da gastoj. Post malfermo de kunveno je 10. horo matene estis legita kaj unuvoĉe aprobita protokolo de lasta kunsido; aplaŭde estis akceptitaj salutaj telegramoj kaj leteroj de kluboj kaj samideanoj ne povintaj persone partopreni.

El *raporto de sekretario* ni citas sole la parton statistikan, ĉar ceteraj sciigoj estis regule publikigataj en nia oficiala organo Ĉ. Ĉ. E.: La 19. de julio 1908, kiam okazis eksterordinara ĝenerala kunveno, havis B. U. E. 15 membrojn; el ĉi tiuj de tiu tempo eksiĝis tri societoj (Brno, kiu pro konataj kaŭzoj ĝis hodiaŭ ne simpatiis kun Unio, kaj al kies eksiĝo ne mankas romantiko, poste Soběslav, kie la rondeto por iu tempo disiris, fine Chrudim, kie trovis eĥon la subfosiga talpa laboro de niaj kontraŭuloj). De tiu tempo sendis siajn aliĝojn 16 novaj societoj, el kiuj du montris sin ĝis nun nekapablaj vivi memstare kaj tiel al la 12 el unua periodo viciĝas novaj 14; sekve B. U. E. centrigas hodiaŭ 26 societojn senescepte vigle laborantajn. Pri multaj el ili oni devas eĉ paroli kiel pri bastionoj de bohema movado esperanta. Plezure oni konstatis, ke B. U. E. plene respondas al bezonoj de centra asocio, kunigante hodiaŭ **pli multe ol 1000 bohemaj Esperantistoj en Aŭstrio**.

En nomo de forestanta *kasisto* prezentas la sekretario bilancon trovitan ĝusta de revizoroj.

Rondiranta ekspozicio de esperantistaj dokumentoj estis sendita en lasta tempo al samideanoj en: Veselí n. M., Nový Bydžov, Prachatice, Soběslav, Písek, Klatovy, Český Brod, Králové Dvůr, Kardašova Řečice kaj Kolín n. L.

Ambaŭ raportoj estis aprobitaj kaj unuanime oni akceptis proponojn de s-oj J. Schwarz kaj J. Jelínek esprimi al la komitato plenan konsenton pri ĝia laboro. Jen teksto de la konfidesprimo:

„Mi proponas sekvantan rezolucion kaj petas, se ĝi estos de vi akceptita, ke oni ĝin notu en la protokolon: Ni, reprezentantoj de kluboj esperantaj kunigitaj per centra asocio B. U. E., aŭdinte ĉe la ĝenerala kunveno la 14. de marto raporton pri ĝia laboro entute kaj speciale pri laboro organiza, esprimas per ĉi tio nian plenan konfidon, konsentante tiel kun ĉio, kion B. U. E. faris en intereso de nia organizaĵo. Ni dankas samtempe por la penega laboro al s-o sekretario K. Procházka, kiu kun vere formika diligenteco kaj kun neordinara entuziasmo sin dediĉis al laboro organiza."

La rezolucio estis same kiel ĉiuj ceteraj decidoj akceptita unuvoĉe.

Sekvis definitiva akcepto de societoj aliĝintaj la lastan tempon. De nun, por simpligi la manipulacion, konforme al regularo de B. U. E., estos la akceptado de novaj membroj farata laŭ sekvanta maniero: La komitato anoncos laŭ sia bontrovo nomojn de aliĝontaj societoj en oficiala parto de Č. Č. E. kaj juĝos ilin enskribindaj kaj citotaj en nomaro sur la kovrilo sole en tiu okazo, se dum daŭro de unu monato duono de la ceteraj membrojsocietoj ne sendos leterojn de malaprobo. Plue decidas la ĝenerala kunveno: Societoj en Hořovice, Žižkov, Jindřichův Hradec kaj Český Brod estu akceptitaj laŭ bontrovo de komitato tuj, kiam ili sendos letere petojn pri enskribo.

Elekto de nova komitato okazis laŭ nova, aprobita regularo:

Prezidanto: s-o Jan Hradil.

Vicprezidanto: s-o Karel Procházka.

Sekretarioj: s-o Otakar Davídek (por aferoj enlandaj),
s-o Frant. K. Svačina (por aferoj eksterlandaj).

Kasisto: s-o Jaroslav Kopecký.

Anstataŭantoj: s-oj Jindřich Jelínek, Josef Jeřábek kaj Ed. Kühnl. Revizoroj: s-oj Jindřich Pohl kaj Jan Vohnout. Anstataŭanto: s-o Josef Šilhart.

Krom tio estis elektitaj pluaj du membroj de komitato s-oj: B. O. Straka kaj Vlad. Tobek.

Administrado de B. U. E. estis laŭ sekcioj jene starigita:

1. organiza (s-o Davídek).
2. propaganda (s-o Kopecký),
3. informa (s-o Davídek),
4. ekspozicia (s-o Straka),
5. kongresa (speciala komit.),
6. ĵurnalista (s-o Jeřábek),
7. konsula (s-o Svačina).
8. redakcia (s-o Kühnl),
9. ekzamena (s-o Hradil).
10. slava (s-o Procházka),
11. lingva (s-o Tobek).

Por plifaciligi la funkciadon de la komitato, oni insiste petas redakti ĉiujn demandojn kaj sciigojn sur specialaj folioj laŭ rilataj sekcioj.

Komuna adreso: Bohema Unio Esperantista Praha I. 342. Esperanto-Kafejo „Union“.

Kiel novaj membroj de ekzamena komisio estis elektitaj s-oj Ot. Davídek, J. Jeřábek, V. Tobek.

I. Kongreso de bohemaj Esperantistoj: Laŭ komuna interkonsento estis decidite: la kongreso okazu

la 26., 27., 28. de septembro 1909

laŭ programo skizita en lasta n-o de Č. Č. E. Pri aranĝo de kongreso zorgu speciala komitato elektota de komitato de B. U. E., kiu petu pri kunlaboro la amuzan sekcion de Esperantista Klubo en Praha. Por kovri la elspezojn estu baldaŭ eldonitaj biletaroj (kongresní bloky), kies folioj estos vendataj inter niaj samideanoj. Prezo de la kongresa legitimacio ne superu sumon de 5 K.

Liberaj proponoj:

Al dr. Zamenhof kaj prof. Cart oni sendis salutajn telegramojn.

S-o Procházka, aludante gravecon de nuna situacio por nia movado, legas tradukon de fragmentoj pri „Nia Fundamento“ el broŝuro „Esperanto und seine Feinde“ kaj proponas sendi al Lingva komitato sekvantan rezolucion:

„Bohema Esperantistaro reprezentata per sia centra asocio Bohema Unio Esperantista, kiu kunigas en 26 societoj pli multe ol 1000 bohemaj Esperantistoj, traktis en sia ĝenerala kunveno la 14. de marto 1909 pri kelkaj demandoj koncernantaj la nunan situacion de nia afero kaj decidiĝis adresi al Vi, kiel al ĉefa lingva institucio, proklamon, ke ĝi konservis ĉiam kaj konservados la netuŝeblecon de „Fundamento“ kaj kondamnos ĉiun klopodon, kiu montros eĉ iom da emo enkonduki en nian lingvon ian arbitran „plibonigon“ de ambiciuloj, kiuj pro persona kaprico, eĉ se ili estus membroj mem de Lingva Komitato, kuraĝus vastigi nefundamentajn novaĵojn, ĉu koncerne la ortografion, ĉu koncerne la lingvon mem. Samtempe B. U. E. admonas la L. K., ke ĝi eĉ ne ektraktu pri similaj kontraŭ-fundamentaj proponoj kiel ekz. estis la formoj „laŭdatas“ (tre senbezone jam pritraktita la lastan tempon!) formoj „iŝi“, „&“ k. t. p.; sen atento pri tio, kiu estas

aŭtoro de simila propono, oni rifuzu trakti pri ĝi kaj oni aludu la „Fundamenton“!

B. U. E. sama fervore batalas por Esperanto kaj por ĝia „Fundamento“, kiel ĝi laboros kontraŭ ĉiu reformisto.

Petante, ke Vi bonvolu publikigi en Via oficiala organo tiun ĉi deklaracion, ni restas . . .

Simila deklaracio estis sendita al dr. Zamenhof.

Generala kunveno bedaŭras plue, ke ĝi devas kondamni agadon de „Internacia Scienca Revuo“ koncerne enkondukadon de „simpligoj“.

Jen teksto de protesto sendita al ĝia redakcio:

„Generala kunveno de centra asocio Bohema Unio Esperantista, traktinte pri grava situacio de Esperanto en tiu ĉi tempo, decidiĝis esprimi al redakcio de J. S. R. sian malkonsenton pri la sistema enkondukado de novajoj nefundamentaj, kiuj aperis en lastaj n-oj de tiu ĉi gazeto, precipe ĝi atentigas, ke ĝi neniel povus rekomendi kaj propagandi gazeton aŭ revuon, kiuj rekte kontraŭ la „Fundamento“ intencas enkonduki novajn superfluajn formojn de skribado (&) kaj kiu sen atento pri komencantoj volas „elprovadi“ novan afiksaron en sia esperanta teksto, novajn gramatikajn „riĉigojn“ (iŝi) k. t. p.

Laŭ jena proklamo direktiĝos la bohema esperantistaro ĝis tiu tempo kaj en ĉiu okazo senescepte, kiam iu ajn revuo esperanta volos laŭ propra kaprico „riĉigi“ tiel nian lingvon.“

Al ligo de germanlingvaj Esperantistoj en Aŭstrio kaj al esperantaj gazetoj estis sendita deklaracio, ke B. U. E. malaprobas intencon de ligo, reprezenti sub nomo de ligo la ceterajn naciojn aŭstriajn. B. U. E. ĉiam plezure laboros sub *sia* nomo komune kun la ceteraj naciaj ligoj aŭstriaj, sed neniel sub komuna nomo Aŭstria ligo — Ligo de germanlingvaj Esperantistoj.

Same estis akceptita propono, ke Unio atentigu la publikon pri sia propaganda kaj organiza celoj kaj protestu kontraŭ sciigoj aperintaj en lasta tempo en kelkaj gazetoj, kvazaŭ la unuiĝita kaj reprezentata Bohema Asocio Esperantista (de izoluloj) partoprenus en projektata kunveno de partianoj de Libera Penso, esperantismo kaj pacifismo. B. U. E., sekvante sole celojn fiksitajn, juĝas ĉiun similan entreprenon kunigantan ideon de Esperanto kaj esperantismo kun ia ajn politika, eklezia aŭ socia partio plene netaŭga maniero de propagando.

A v i z o: La ĝenerala kunveno admonas kasiston, ke li urĝu alsendon de ĉiuj ŝuldataj kotizajoj. Por jaro 1909 restas la kotizajo neŝanĝita, nome 40 hel. por ĉiu membro jare.

R o n d i r a n t a k o l e k t o d e m u z i k a j o j e s p e r a n t a j: Oni petas, ke la kolekto, sendata prunte al niaj kluboj, estu laŭ

ebleco baldaŭ resendita al nia redakcio, ĉar ĝi estos plenigita je kelkaj novaj verkoj. Societoj aŭ samideanoj, kiuj deziras ricevi prunte tiun ĉi kolekton, sendu al kancelario de B. U. E. leteron kun 20-hel. poŝtmarko.

Fine oni atentigas membrojn de B. U. E. pri rolo de Lingva Sekcio, kiu respondados la ricevatajn demandojn pri gramatiko, sintakso k. t. p. ĉu per leteroj, ĉu per nia oficiala organo.

*   *

STŘEDISKO ČESKÝCH ESPERANTISTŮ. Ústřední svaz „Bohema Unio Esperantista“ pořádal v neděli dne 14. t. m. řádnou valnou hromadu ve spolkové místnosti kavárny „Union“ v Praze. Ze sdružených 26 spolků obeslalo 14 schůzi svými zástupci. Valné hromady súčastnilo se celkem 45 osob. S potěšením konstatováno, že B. U. E. skutečně vyhovuje úkolu ústředí co nejlépe, sdružujíc dnes přes *1000 Esperantistů* v Předlitavsku. (V uplynulém roce vykazoval protokol na 3500 dopisů.) Z významných usnesení schůze, která vesměs přijata byla jednohlasně, vyjímáme: Rozhodnuto uspořádati letošního roku I. kongres českých Esperantistů v Praze ve dnech 26., 27. a 28. září, k němuž započaty již přípravné práce aranžováním přednášek po českém venkově a pod. Rozšířena zkušební komise, která ve svém novém složení bude zasedati v pondělí 12. dubna t. r. Jmenováni předsedové jednotlivých sekcí: organisační, propagační, informační, výstavní, kongresní, žurnalistické, konsulární, redakční, zkušební, slovanské a jazykové. Zasláno ústředí rakouských německých Esperantistů ve Vídni a předním listům českým i esperantským prohlášení, v němž „Unie“ vyslovuje se rozhodně proti snaze této ligy, pokud se týče zastoupení B. U. E. jejím jménem. B. U. E. jest vždy ochotna pracovati pod vlastním jménem společně v e d l e jednotlivých esper. ústředí ostatních národů rakouských, nikoliv však pod jménem „Ligy rakouské“. Rovněž přijat návrh, aby „Unie“ upozornila stejnou cestou českou veřejnost na svůj úkol propagační a organisační a ohradila se proti zprávám vyskytnuvším se poslední dobou v některých listech, jakoby zastupovaný Svaz Českých Esperantistů (jednotlivců) byl spolučinitelem ve schůzi projektované přáteli volné myšlénky, esperantismu a pacifismu. B. U. E. považuje každý podobný podnik, sdružující myšlénku Esperanta a esperantismu s jakoukoliv stranou politickou, náboženskou nebo socialní za zcela nevhodný způsob propagace. *)

---

*) „Ústřední svaz českých Esperantistů Bohema Unio Esperantista prohlašuje na své řádné valné hromadě dne 14. března 1909, že nemá nic společného s projektovaným sjezdem přátel volné myšlenky, pacifismu a esperantismu, háje dle deklarace o esperantismu přijaté prvním kongresem v Boulogne sur Mer vždy stanovisko úplné neutrality Esperanta co se týče národnosti, vyznání a politiky.“

Do výboru Unie zvoleni pp.: J. Hradil předsedou, K. Procházka místopředsedou, Ot. Davídek a F. K. Svačina jednateli, Jar Kopecký pokladníkem. — Všechny dotazy týkající se Esperanta (zkoušek, přihlášek do adresáře, kongresu, přednášek atd.) buďtež adresovány pouze: Kanceláři ústředního svazu Bohema Unio Esperantista en Praha I. 342. Kavárna „Union“.

Za členy B. U. E. hlásí se kroužek v Táboře a klub v Praze VII.

PARTO NEOFICIALA.

KRISTNASKA NOKTO.

Alvenis kristnasko de malfeliĉa por Francujo jaro 1870. Parizo ĝemis ĉirkaŭata per rondo de venkantaj Prusoj dum la cetera mondo ĝoje festis alvenon de plej belaj festoj de paco kaj kvieto. — Estis senbrua, stelriĉa antaŭvespero. Ĉirkaŭajon de Parizo kovris freŝblanka neĝo brilanta en dubeblua lumo de pala luno. Profilo de urbego kun palacoj, preĝejoj kaj bastionoj desegnis sin akre en stela ĉielo. Ĉie regis sankta senvoĉeco. Nur post muroj estis vivo, en profundaj fosaĵoj, en kiuj ĉi tie kaj tie brulis malgranda fajro; ĉirkaŭ fajrejo, plej diverse grupiĝintaj, staris francaj soldatoj kun malaltaj kepoj. Kelkaj interparolis, aliaj trinkis el boteloj kaj eĉ gaja strata kanteto sonis de ie. Estis nur malmultaj, kiuj, sidante senvoĉe, rigardis malproksimen. Al tiuj apartenis ankaŭ juna kuraĝa kapitano; li profunde meditis, fiksante okulojn sencelen . . .

Li pensis pri hejmo ie en suda Francujo, en animo vidante siajn karajn ĉe komuna tablo sidantajn. Ne ĉiuj ĉeestas; unu loko estas malplena: ĝi estas la lia. La infanoj demandas patrinon, kiam patro revenos kaj ĉu ankaŭ lin vizitos Jesueto. Juna, bela edzino respondas jese, sed samtempe ŝi deturnas kapon, por ke infanoj ne ekvidu larmojn en ŝiaj okuloj. Kaj ili nenion ekkonas; ili ne scias, ke ilia patro fruntestaras hodiaŭ en nigra foso kontraŭ malamiko, ĉiumomente preta oferi sian vivon al patrujo. (?) — — Lipoj de kapitano konvulsie ektremis kaj nur pene li detenis larmon. —

„Sinjor' kapitano, mi petas obeeme kelke da minutoj liberaj,“ kaj. fingrojn tenante ĉe kepo, stariĝis juna soldato antaŭ kapitano.

Ĉi tiu malreviĝis. Kiam soldato ripetis denove sian peton, li ekkriis mire: „Ĉu vi perdis prudenton? Ĉu vi ne scias, ke mi nenion devas eĉ nur por momento forpermesi?“ „Kapitano, mi tamen kuraĝas peti permeson denove; vi tion ne bedaŭros.“

„Neeble,“ respondis kapitano klare, „tiam mi devus permesi al tuta kompanio foriri en urbon.“ „Mi ne volas iri en urbon, sed tien“ respondis soldato, montrante al remparoj de malamikoj, de kie aŭdiĝadis bruo kaj vokoj:

„Halt, wer da?“*)

Kapitano miregita ekkriis: „Sensaĝulo! kion vi intencas fari tie — antaŭ malamikoj? Se vi forlasos fosajon, ili tuj komencos pafi sur vin kaj vi edziĝos kun morto.“ „Sed sinjor' kapitano, ne fariĝos tiel, se ili ne ekvidos ĉe mi batalilon. Mi vin petegas, ne volu ekscii mian intencon antaŭ ĝia plenumo.“ Kapitano konis soldaton kiel homon kleran, tre bone konatan en francaj literaturaj sferoj, kaj tiel, ne timante ke la kuraĝulo faros malhoneston, li diris post momento: „Do mi permesas, sed nek per unu haro mi juras vian vivon.“ —

Soldato salutis kaj foriris. Metinte sur teron sian pafilon, li lerte elsaltis el fosajo sur neĝokovritan ebenajon. Liaj kolegoj atente rigardis super fosajojn por vidi, kio fariĝos.

Foririnto estis bone videbla en hela lunbrilo sur blanka neĝa tapiŝo. Germanaj postenoj silentiĝis: neniu kuraĝis pafi sur fremdulon, kiu haltis kaj salutis malamikon.

Kaj aŭdu! tra trankvila nokto sonas bela franca kanto kristnaska, per riĉa sono kaj kun varma entuziasmo kantata. Amikoj eĉ malamikoj detenas spiron kaj aŭdas per tuta animo. Neeldirebla ĉarmo okupis ilin.

Kanto sonas tra mallaŭta nokto kiel sono venanta el regionoj paradizaj, kie ekzistas nek krimo nek malamo. Ĉiu el brutalaj militistoj rememoras malproksiman patrujon kaj varman hejmon; en ĉies okuloj, dekutimintaj jam de longe plori, brilas larmo.

Kanto finiĝis. La soldato, salutinte, turniĝis kaj revenas al fosajo.

Malsupren saltinte, li estas superŝutita per laŭdaj vortoj; mem la kapitano alrapidas kaj ekpremante lian manon, esprimas siajn sentojn kaj dankojn.

Subite ĉiuj estas alvokitaj rigardi ankoraŭ unufoje post remparon: el malamika posteno eliras granda soldato kaj proksimiĝas; haltinte, li komencas kanti per forta voĉo unu el la plej belaj kantoj germanaj. Surprizitaj Francoj aŭskultas ĝis al fino, kiam la soldato, salutinte laŭ ekzemplo de sia antaŭulo, reiras malaperi en fosajo.

Kaj aŭdu! El germanaj remparoj resonis ĝojaj ekvokoj. Weihnacht! Weihnacht! **) kaj entuziasmitaj Francoj laŭvice respondas: Noël! Noël! Por momento degelis glacia krusto sur la koroj de obstinaj malamikoj kaj ĉiujn kunigis ligilo de humaneco kaj de paco. —

Luna brilo estingiĝis, horizonto eklumiĝadas — vekiĝas kristnaska mateno. Griza nubo vualas montetojn ĉirkaŭantajn Parizon.

*) Halt', kiu estas?
**) Kristnasko (germ., fr.)

Sajnas, ke ĉio dormas — subite ruĝa fulmo sur malproksima monto traboras malpezan nubon kaj en matena aero ekbruegas pafo kiel tondro; unua prusa grenado eksplodis proksime de franca fosajo. El tie eksonis klare unua salvo. Post kelke da momentoj similis ĉirkaŭajo de Parizo la gorĝon de granda vulkano eljetanta morton kaj detruon — — —

Pacaman nokton sekvis sangavida mateno . . .

ĈU VI SCIAS, KE . . .?

. . . en Wien loĝas proksimume 400.000 Bohemoj, kiuj havas tie eĉ ne unu preĝejon, kie la diservo estus bohemlingva; por iliaj infanoj ekzistas tie neniu publika lernejo bohema; ili ne havas rajton elekti memstare eĉ unu deputiton por la parlamento, kvankam 15.000 Germanoj en Kočevje ĝin havas. Pli multe ol 200 bohemaj societoj estas en Wien.

. . . unu miliardo da minutoj post la naskiĝo de Kristo pasis nur la 29. de aprilo 1902 je 10 horoj 40 minutoj antaŭtagmeze ?

. . . multaj homoj eĉ ne ĝisvivas miliardon da sekundoj, t. e. ne plenajn 32 jarojn ?

. . . kampisto, kiu jare marŝas post la plugilo 720 km. kaj tiel faras dum 55 jaroj kaj 234 tagoj, faris vojon de 40.068 km. t. e. ĝuste la vojaĝon ĉirkaŭ la terglobo laŭ la ekvatoro.

. . . la plej granda preĝejo en la mondo estas tiu de sankta Petro en Romo, en kiun eniras 45.000 homoj; poste la preĝejo de s. Paŭlo en Londono por 38.000, katedralo en Milano por 37.000, en Köln a/R. por 30.000, Aja Sophia en Konstantinoplo por 23.000, preĝejo de s. Johano Laterana en Romo por 22.000, preĝejo de s. Stefano en Wien kaj katedralo en Pisa 12.000, de s. Dominiko en Bologna 11.500, preĝejo en München 11.000 homoj.

. . . la tuta Eŭropo pagas jare al siaj regantoj sumon de 169,270.000 kronoj.

. . . laŭ ĝisnuna multiĝado de loĝantaro havos Eŭropo en jaro 2000 pli multe ol 940 milionojn da loĝantoj. Hodiaŭ vivas en Eŭropo 400 milionoj da homoj.

. . . ĉiuj maroj de la terglobo enhavas tian kvanton da saloj, ke oni povus fari el ili tavolon dikan pli ol 10 metroj sur la supraĵo de la tuta tero. Tiuj saloj ludas rolon de egaliganto en la mastrumado de la terglobo, ĉar ili malhelpas al ventoj levi troan kvanton da vaporoj, kiuj, fariĝante akvo, povus subakvigi la moderajn regionojn.

. . . nuntempe ekzistas sur la tero 325 ~~kativaj~~ aktivaj vulkanoj.

. . . per la tertremoj de post Kristo ĝis al nia tempo pereis pli ol du milionoj da homoj.

. . . Bohemujo estas dekmilono de la tuta tera suprajo, kaj 2630-ono de la kontinento.

. . . la loĝantaro de Bohemujo estas 250-ono de la tera loĝantaro; sur unu kvadrata kilometro en Bohemujo loĝas meznombre 122 homoj, kaj sur la kontinento nur 12·2.

. . . tutmonda produkto de plateno faras jare proksimume 6000 ĝis 7000 kg, kaj de oro 500.000 kg.

. . . en Eŭropaj ŝtatoj oni difinas 1/17 de ĉiuj enspezoj por lernejoj, 1/5 t. e. 6400 milionojn por soldatoj. Sekve, kara leganto, eĉ se vi estas antimilitaristo, vi subtenas la soldataron per 17 kronoj ĉiujare!

. . . (laŭ Le Monde Espérantiste) nombro de vortoj, kiujn scias kaj uzas homo mezinstruita en gepatra lingvo estas sufiĉe limigita kaj ne superas kelkajn milojn (3-ĝis 4000).

GRAVAJ ELTROVOJ.

Kiu eltrovis la ŝtalplumon? Ŝtalajn plumojn eltrovis kaj konstruis en jaro 1820 instruisto James Perry en malgranda vilaĝeto apud Londono. Ĉar li ne estis riĉa li vendadis siajn plumojn ĉe londona foiro kaj li atingis tian sukceson, ke post du jaroj li rezignis la instruistecon kaj fariĝis la una fabrikisto de ŝtalplumoj. En jaro 1825 li havis jam 50 laboristojn, kiuj pretigadis la plumojn sen helpo de maŝinoj. Tiutempe aĉetis teksista submajstro Josua Masson tri ŝtalajn plumojn kaj komencis cerbumadi, kiel estus eble pretigi ilin per helpo de maŝinoj. Li laboris je tiu ideo ĝis la jaro 1830. Poste li transloĝis en Birminghamon kaj fondis tie fabrikon je ŝtalplumoj. Ambaŭ eltrovintoj Perry kaj Masson treege riĉiĝis.

Kiu eltrovis la kudromaŝinon? La kudromaŝinon dankas miloj da homoj por nutrado kaj ni preskaŭ ne povas sen ĝi imagi la hodiaŭan grandegan vestindustrion. Sed ĝian eltrovinton oni malofte rememoriĝas. Ĝi estis meĥanikisto Elias Howe en Boston, hometo penema kaj entreprenema, kiu eble antaŭ duonjarcento okupadis sin per ideo, konstrui kudromaŝinon. Li vizitadis tajlorajn laborejojn por ekkoni tajloran laboron, sed oni pensis, ke lia cerbo ne estas en ordo. Meĥanikisto kaj li enmiksiĝas en metion de tajloroj! Howe faris diversajn malsukcesintajn eksperimentojn, sed fine li trovis ĝustan vojon. Li prenis du fadenojn, pecon da ŝtofo kaj kurbigitan kudrilon. La unuan fadenon li bobenumis en boateton, kiun li fiksis sub tabuleton. Kudriltrueton li faris senpere apud la pinto, traŝovis tra la trueto la alian fadenon,

ekmovigis la boateton kaj la kudrilon — kaj jen, maŝinprincipo estis trovita. En jaro 1844 konstruis Howe kompletan lignomodelon kaj en jaro 1845 li muntis kun sia kunlernanto Fischer kudromaŝinon el ŝtalo, per kiu la unuan fojon estis kudrita vesto. Certe longe ĝi daŭris, ol estis venkita kontraŭstaro de tajloroj kontraŭ la nova maŝino, ĉar ili timis pereon de sia metio. Nur en jaro 1850 estis Howe juĝata kiel eltrovinto de kudromaŝino kaj komencis rikoltadi fruktojn de sia laboro. Pli malfrue perfektigis kudromaŝinon Ignaz Singer.

Kiu eltrovis la skribmaŝinon? Sendube estas malmulte konate, ke jam en jaro 1829 estis en Nordameriko donita patento je skribmaŝino, kiun eltrovis William Burt. Sed la eltrovinto ne estis feliĉa; en mallonga tempo li estis devigita vendi sian eltrovaĵon por 75 dolaroj, ĉar la tiama publiko ne sciis ankoraŭ taksi la neordinaran gravecon de tiu ĉi maŝino. Sed eĉ tiu ĉi prezo ne ŝajnis esti al la aĉetinto sufiĉe modera. En tutmonda ekspozicio en Chicago estis en fako de „onklo Sam“ elmontrita kiel specialaĵo letero de tiu aĉetinto al la eltrovinto, en kiu li petas pri redono de mono, ĉar li faras kun la eltrovaĵo neniujn negocojn; krom tio estis ekspoziciita la patentdiplomo subskribita de prezidanto Andreas Jackson kaj la bildo de originala maŝinmodelo, kiu bruliĝis en jaro 1836. *Li.*

KIEL HELPI AL LINGVA KOMITATO?

Uzu en filologia demando filologian metodon.

Kolektu la novajn vortojn, la novajn radikojn, kiujn vi renkontas ĉe la plej bonaj verkistoj;

komparu tiujn vortojn kun aliaj samsencaj uzitaj de aliaj verkistoj;

ordigu tiujn vortojn laŭ kritika metodo, aldonante rimarkojn pri ilia deveno, pri ilia taŭgeco;

traduku ilin zorge en diversajn naciajn lingvojn;

komparu la diversajn naci-esperantajn vortarojn;

la samon faru por la diversaj dirmanieroj kaj sintaksaj esprimoj;

studu specialan verkon de D-ro Zamenhof, de Kabe, k. c. el lingva vidpunkto: vortfarado, uzo de l' artikolo, de l' adjektivo, de la kazoj, de la tempoj, de l' adverboj, de la prepozicioj k. t. p.

Ne mankas interesplena laboro, kiu samtempe estos utila al ĉiuj, ĉar per tia studado vi baldaŭ konvinkiĝos, ke mirinda, — pli mirinda filologie ol multaj samideanoj opinias, — estas la ilo, kiun donis al ni Dr. Zamenhof.

Poste, tiujn laborojn, zorge redaktitajn, klare skribitajn, oni sendu al la Lingva Komitato.

Oni ne dubu, ke kun danko ĝi akceptos tian fruktoriĉan kunlaboradon! *Th. Cart.*

Z CELÉHO SVĚTA.

V. Světový kongres Esperantistů. Floraj ludoj: Podle národního zvyku, rozšířeného v pyrenejských krajích, bude uspořádán během kongresu „zápas" literátů-Esperantistů. Themata soutěžících prací, které jednají o lásce, věrnosti a humanitě, jsou stanovena korporacemi nebo osobami, které současně věnují odměny nejlepším pracem. Ze značného množství vypsaných cen k letošnímu zápasu (na 50) jmenujeme cenu krále Alfonse XIII. a královny Viktorie Eugenie (250 peset za nejlepší práci na thema: Monografio pri hispana pentristo), ministra vnitřních záležitostí, rektora barcelonské university, biskupa urgellského, poslance Ryusy Torres, dra. L. L. Zamenhofa, městské rady vilasarské, četných redakcí časopisů národních i esperantských atd. — Ubytovací výbor sděluje ceny lístků oprávňujících k sedmidennímu pobytu v kterémkoli z esperantských hotelů: 35 peset, 52½ pesety, 84 pesety. V cenách zahrnuty vedle ubytování i snídaně, obědy a večeře. Protože není možno zasílati prostřednictvím pošty peněžní obnosy do Španělska, upozorňujeme, že příspěvky přijímá též Centra Oficejo v Paříži (rue Clichy 51).

Subvenci 300 franků obdržel opět spolek Esperantistů v Toulouse od městské rady. Rovněž spolku v St. Etienne bylo uděleno 300 franků. V Rouenu udělena subvence 50 fr. místnímu spolku. — Sdružení **severofrancouzských** klubů organisuje krajinský kongres. — Nová obchodní akademie a exportní akademie ve Vídni otevřely **kursy** Esperanta. — Na sjezdu v Haagu přijaly vlády za sprostředkující řeč **policie** při stycích mezinárodních Esperanto. Jak známo, vyučují se Esperantu policisté již v četných městech. — Ku Svazu **Amerických** Esperantistů přistupuje každý měsíc přes 400 nových stoupenců. — Dosud vydávaný **adresář Zamenhofův**, který vycházel v květnu každého roku, vyjde letos naposledy, neboť počet nových přátel Esperanta stoupá již tou měrou, že není možno podobnou publikaci redigovati. Místo adresáře Zamenhofova budou vydávány adresáře jednotlivých národních svazů: pro Čechy připravuje R o č e n k u, obsahující adresy českých i cizích dopisovatelů, seznam klubů, všech časopisů atd. ústřední svaz „Bohema Unio Esperantista" v Praze I. 342, jemuž mají se přihlášky zasílati. (Ročenka bude též pokračováním Faukner-Adresaro). Cena i se zápisným 40 hal. vypl. Doporučujeme zaslati

adresu (s udáním podrobností) o čem přejete si dopisovati, co nejdříve, aby dostatečný počet přihlášek umožnil brzké vydání této české oficielní ročenky.

„Oficiala Gazeto Esperantista“ oznamuje, že ekzistovalo 5. února t. r. **1311 spolků propagačních, 317 konsulátů, 79 časopisů a 129 spolků odborných,** dopisujících Esperantem.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Výbor **Svazu Českých Esperantistů** oznamuje, že bude pořádána *valná hromada Svazu dne 18. dubna t. r.* (místo o svátky svatodušní), o 10. hodině dopoledne ve spolkové místnosti restaurace „u Donátů“ (Spálená ul.). U příležitosti této schůze pořádá „KLUB ESPERANTISTŮ V PRAZE“ v sobotu dne 17. dubna t. r. **ZÁBAVNÍ VEČER** s bohatým programem česko - esperantským a s taneční zábavou v místnostech Československé Obchodnické Besedy (Jerusalemská ul.)

* *

Bohema Asocio Esperantista anoncas ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la 18. de aprilo en restoracio „u Donátů“. — Kursoj malfermitaj en bohema politeknika lernejo estas regule vizitataj de 60 personoj. Kotizajo 1 K (por stud. 50 hel.). — Esperantista Klubo en Praha havis sian ĝeneralan kunvenon la 27. de februaro. El raportoj ni citas: 1939 leteroj estis forsenditaj kaj alvenis: spezo de kasisto **2490 K** 46 hel.; nombro da membroj 145. En la biblioteko estis disponeblaj krom 16 abonataj gazetoj 320 libroj (je fino de marto 1909 enhavas la biblioteko 402 verkojn). Komitato elektita por 1909: s-o Prof. dr. Václav Rosický prezidanto, s-o Jan Hradil vicprezid., s-o Ot. Davídek sekr., s-o Boh. Davídek kasisto, s-o Vlad. Tobek bibl., s-o Frant. Štěpánek protokolisto, s-o Jar. Kopecký revuisto, s-o Boh. Straka arĥivisto. *Ĉiuj nomitaj sinjoroj estas elektitaj unuvoĉe.* Pri kursoj, paroladoj kaj eldonajoj estis raportite en nia organo. En la kunveno estis starigita amuza sekcio, kies prezidanto estis elektita s-o R. Saxl, sekretario s-o B. O. Straka. La sekcio aranĝis por membroj de klubo unuan amuzan kunvenon la 17. de marto. Grandan publikan feston kun riĉa programo bohema-esperanta preparas la sekcio je la 17. de aprilo en ĉambrego de komercista societo Č. O. B. La amuza sekcio fariĝos grava faktoro en projektataj laboroj por nia I. bohema kongreso. — **Publika legejo** de esperantaj gazetoj en kafejo „Union“ enhavas jam 30 gazetojn. — Studenta Rondeto Esperantista en Praha nomis prezidanton de Esperantista klubo s-on prof. dr. Václav Rosický sia honora prezidanto pro simpatioj, kiujn li montris al ideo de propagando de Esperanto inter studentaro. — „Matiční odbor mládeže“ en Praha anoncas al ni fermon de sia elementa kurso, kies lernantoj fariĝis fervoraj samideanoj. — Esperantista klubo „Nova Stelo“ en Žižkov malfermis 19. de marto kurson en hotelo Suchý; instruas s-o E. Kühnl (vendredo $8^{1}/_{4}$ - $9^{1}/_{2}$ vespere. La klubo fondita de nia fervora amiko s-o J. Kopecký havos baldaŭ fondan kunvenon, kaj ni povas prave esperi, juĝante laŭ ĝisnunaj aliĝoj.

ke ĝi fariĝos grava bohema centro esperantista. — En Praha VII. fondiĝis klubo, kiu sendas sian aliĝon al B. U. E

Laborista Klubo „Zamenhof“ en Plzeň aranĝis dimanĉon la 21. de marto amuzan kunvenon. La 2. de marto estis malfermita nova kurso de s-o Bedř. Tytl. — Inter la urba policanaro montriĝas vigla intereso por nia lingvo. Speciala kurso estos malfermita. — Kurso en Č. Budějovice finiĝis. Nova kurso estos malfermita la 31. de marto. Lokaj jurnaloj alportis refoje artikolojn de s-o Svačina. La grupo havis la 24. de februaro ĝeneralan kunvenon. Dum la pasinta jaro estis aranĝitaj kursoj elementaj kaj superaj, kurso en supera knabina industria liceo (s-o Svačina), kurso por studentoj kaj membroj de komercista societo Č. O. B. (s-o K. Šafář kaj A. Jakeš). Bilanco: Enspezo (kun resto el 1908): K 51·07, elspezo K 45·72; resto K 5·35. Kiel membroj de komitato estis elektitaj unuvoĉe s-o F. K. Svačina prezid. kaj s-oj Jar. Dítě vicprezid., Ant. Jakeš sekr., Jan Popela kas., Karel Fenzl bibl. La membra kotizaĵo restas neŝanĝita sed kotizaĵon por B. U. E. (40 hel. jare) pagos ĉiu membro plie. — Hradec Králové. Esperantista Rondeto aranĝis la 20. de marto amuzan kunvenon en sia sidejo „U Hiršlů“ por festi la fermon de kurso. — Praskačka. Danke la klopodon de s-o deputito Vinař, prezidanto de Esperantista Klubo, alportas „Hlas Venkova“, redaktata de s-o J. Horák rubrikon esperantan de s-o Jeřábek. La rubriko enhavas represon de lernolibro de Kühnl. Ĉiuj interesiĝantoj pri agronomiaj demandoj abonu kaj legu tiun ĉi semajnan ĵurnalon. — „Maja Stelo“ en Osek u Rokycan aranĝis la 14. de marto teatran prezentadon. Ĉiuj membroj simpatias plej sincere kun nia afero, kaj „kvankam ili estas malmultaj simplaj vilaĝlaboristoj“ tamen ili ellernis kaj posedas perfekte Esperanton. (Prezid. s-o Jan Forejt, sekr. s-o Jos. Aubrecht, bibl. s-o Jos. Černý). — Mladá Boleslav: Esperantista Klubo, kies regularo estis ĵus aprobita, anoncas baldaŭan kunvokon de ĝenerala kunveno. — Esperantista klubo en Trutnov, kiu havas jam 50 membrojn, anoncis al ni per bele presitaj invitkartoj sian amuzan kunvenon, kiu okazis la 21. de marto. El diversaj bone elektitaj punktoj de programo ni notas: Himno Espero, ĥoro; Al la fratoj; teatra ludo „La Renkonto“ k. a. Orkestro de s-o V. Šrétr. Ni estas konvinkitaj, ke laboro de aranĝintoj ne estos senfrukta kaj ke baldaŭ ni legos pri novaj sukcesoj. (Komitato de la klubo: s-o Jos. Šilhart, prezidanto, s-o K. Říha vicprezid., s-o Jos. Bartoš sekr., s-o F. Dvořák kas., s-o N. Věchet bibl., s-o. K. Arlot, N. Friml membroj.) — En Písek aliĝis al esperantista klubo jam 50 personoj. Prezidantino estas f-ino Fr. Křivancova, vicprezid. s-ino El. Kavalírová, sekr. s-o Aug. Hrubec, kas. f-ino M. Kvardova. La 28. de marto okazos en granda ĉambro de urba domo parolado de s-o K. Procházka. — Grava festo okazis en Hostomice pod Brdy la 20. de marto: La klubo ricevis diplomon de „Ústřední Matice Školská“ por monofero de 100 K kaj samtempe ĝi mem transdonis diplomon de honora membreco al sia fondinto, nia vigla samideano s-o Fr. Novák. La feston ĉeestis kiel reprezentantoj de B. U. E., B. A. E. kaj de ceteraj societoj el Praha s-oj ing. Fr. Kühnl kaj Vl. Tobek. — Komitato de Esperantista Rondeto en Pardubice: s-o Fr. Košťál prezid., s-o Rud. Hladík vicprezid., s-ino A. Petrova sekr., s-o E. Kohoušek kas. La rondeto gajnis tre ŝatindan novan membron s-on J. U. Dr. Fousek, kiu laboris

ĝis nun fervore por diskonigo de Esperanto en Chrudim; la sama reprezentas la Rondeton en B. U. E. — Privatan kurson malfermis kelke da amikoj en Libochovice. Por veki pli multe da intereso en sia ĉirkaŭaĵo pri Esperanto oni projektas paroladon, kiun arangos B. U. E. — Kurso en Ústí nad Orlicí havas bonan sukceson, malgraŭ tio, ke kelkaj lernintoj ĉesis partopreni. Ĉiuj restintaj lernas diligente kaj tradukas eĉ interparolas jam bone. — Rondeto esperantista en Tábor aranĝas kurson en agronomia akademio (marde, ĵaŭde; 1—2 horo). Instruas s-o R. Ez. Cikhart. En la kunveno okazinta la 13. de marto estis elektita s-o J. Jež prezidanto, s-o Kamberský kasisto. La rondeto anoncas sian aliĝon al B. U. E. — Český Brod. Pro multaj kaŭzoj, inter kiuj ne la lasta estas laboroj por la projektata regiona ekspozicio, la kurso esperanta estas prokrastita ĝis aŭtuno. En tiu tempo ankaŭ la klubo definitive konstituiĝos. (Vidu parton oficialan.) — Belan sukceson havis parolado de s-o F. Zadák, instruisto el Bzová apud Žebrák: En Komárov apud Hořovice li malfermis la 6. de marto per nelonga parolado (antaŭ 150 personoj) pri historio kaj signifo de Esperanto publikan kurson, kiun gvidas nun s-o Emil Ondříček el Komárov. Inter la cento da interesiĝantoj certe plimulto restos vigla ĝis lasta leciono! — Ĝenerala kunveno de societo esperantista J. A. Komenský en Chrudim okazis la 23. de marto en hotelo Bída. Ĉefa punkto de la programo estis starigo de komitato. La societo adiaŭis du eminentajn membrojn s-on Dr. Jos. Fousek (nun en Pardubice) kaj s-on ing. Rud. Jakl (nun en Jaroměř). Kursojn gvidas s-oj: Fr. Brož, Ant. Růžička kaj K. Kudrna. — Lišov. Dek Esperantistoj fondis rondeton kaj kuniĝos kun B. U. E. Kurso gvidata de s-o Rich. Renner okazas dufoje ĉiusemajne. — Laŭ sciigo de s-o dr. Neuman aranĝis la rondeto esperantista en Veselí n. M. la 26. de januaro paroladon de f-ino Řehákova, instruistino, kiu tre interese rakontis pri sia vojaĝo al Dresdena kongreso. La parolado estos represita en iu loka ĵurnalo. — S-o Jos. Krejčiřík el Přerov sciigas al ni, ke estas enskribitaj 60 lernantoj en kurson, kiu baldaŭ estos malfermita. — Telč. Laŭ sciigo de s-o K. Frám estos malfermita kurso post nunjara libertempo. B. U. E. traktas kun s-o prof. Kasalý pri aranĝo de kurso. — Vsetín. Fonda kunveno de esperantista societo okazos la 31. de marto en legejo de societo „Snaha". — En Prostějov instruas pri Esperanto s-o Ulman siajn kunlernantojn de gimnazio, ricevinte por tio permeson kaj ĉambron de direktoro de gimnazio. La kurson partoprenas 25 studentoj de pli altaj klasoj. — Bohema Klubo Esperantista en Wien baldaŭ estos fondita definitive; por interrilatiĝi la pionirojn, kunvokis s-o K. Macháček kaj kelkaj bohemaj Esperantistoj specialan kunvenon la 9. de marto. Pluajn sciigojn ni atendos senpacience.

BIBLIOGRAFIO.

Normanda Stelo, monata bulteno eldonata de esperantista grupo en Rouen. Red. kaj adm.: M. Liébard, Leroux, 41. rue de la Vicomté, Rouen (8 pĝ. 16 × 25). Jare: 1 Sm (en Francujo 1 Fr.).

Diversaj verkoj:

Dr. phil. Albert Schramm: ***Fortbildungsbuch für den Esperanto-Unterricht*** (59 pĝ. 12 × 18). Heckners Verlag, Wolfenbüttel. – K. Schönherr: ***Lehr- und Übungsbuch des Esperanto*** (189 pĝ. + VIII. 14 × 22). Prezo M 1·75. Verlag: Emil Boden, Dresden. — Dr. Ambrosio Vargas: ***El Esperanto y la Medicina***, conferencia sobre el idioma internacional Esperanto (19 pĝ. 14 × 22). México. — Gabrjelo Haddâd, pastro Maronita (Libanon) ***Kitâb ussûl-i-lughat l'Esperanto al-jâmiâat. Gramatiko de Esperanto verkita en lingvo araba*** (56 pĝ. 17 × 24). Prezo Fr. 1·50. Eldoninto: L. Giambene, Roma. — Alberto Gómez-Cruz: ***Rudimentos de Esperanto.*** Lernolibro por Hispanoj (82 pĝ. 12 × 18). Prezo K 1·80 (75 Sd). Eld.: Quadalajara, México, Morelos 995. ap. 115. — F. Maréchal: ***Trezoro de l' Sorĉistoj*** (64 pĝ. 12 × 17). Prezo K 1·20. (Kvar, ne senerarај artikoloj). — Jose D. Galicano: ***Kapulungang Diutay*** sa Esperanto ug binisaya cadaghanan niini ang mga polong sa Universala vortaro (26 pĝ. 12 × 17). Manila St. Cruz. Noria 35. — J. Arbes: ***Rakontoj.*** Trad. J. Grňa (146 pĝ.). Prezo Fr. 1·60. (Ĉeĥa ???) — Dr. Rolfo Dezo: ***I. Esperu. II. Mi amas Vin.*** Du kantoj. Prezo K 1·20. Eldonita por voĉo kaj fortepiano. K. E. Krupka, Hradec Králové. — ***Kopenhago,*** ilustrita gvidlibro, eldonita de Centra dana Esperantista Ligo. Verkita de K. Bendix (24 pĝ. 20 × 13). — ***Frazlibro por Esperantistoj en Kopenhago*** (31 pĝ. 7 × 11). Eld. Bierfarejo de Karlsberg. – ***Kristana Esperanta Kantareto.*** 11 kantoj kun melodionotoj (18 pĝ. 11 × 15). Prezo 25 Sd. Eld.: P. Hübner, Mülheim a. R.

Le mois bibliographique (bulletin mensuel de la libraire francaise F. Topič, Prague) enhavas ĉiumonate nomaron de novaj esperantaj verkoj redaktatan de B. U. E.

Japana Esperantisto de tiuĉi jaro fariĝas internaciamonata gazeto, ne nur nacia propagandilo, kaj pritraktas ĝeneralajn ĉiuspecajn temojn kun multaj ilustraĵoj pri la Ekstrema Oriento. Ĝi multe interesos okcidentanojn per sia originaleco. Pro tiu ŝanĝo la abonkosto estas plialtigita je 2 yen (4·80 kr.) jare.

Metheda Kühalova: Úplná methodická učebnice Esperanta pro školy a samouky. II. vydání. 1909. Cena 2 K (váz. K 2·40). 144 str. „Biblioteko de Časopis Českých Esperantistů“ n-o 3.

Kniha zpracována jest na základě Zamenhofova „Fundamento de Esperanto“ a schválena zkušební komisí ústředního svazu Bohema Unio Esperantista. Autor podává v osmi úlohách způsobem snadno pochopitelným podrobně vše, čeho k dokonalému osvojení si Esperanta znáti třeba: methodické uspořádání látky,

jakož i cvičebné texty dvoujazyčné jsou vítanou pomůckou začátečníkům samoukům i učitelům Esperanta v kursech. Učebnice ta jest první původní prací v naší české literatuře. Obsah: Část gramatická. Vzorná čítanka. Rozmluvy. Systematický slovník. Deveno kaj Historio de Esperanto. Klíč Esperanta se slovníčkem.

(Podotýkáme, že kniha tato jest sepsána na základě českého jazyka a nemá nic společného s *překladem francouzské brošury*, vydaným pod stejným, opsaným titulem na Moravě.)

Dle archů Úplné methodické učebnice Esperanta pro školy a samouky (**Methoda Kühnlova**), která vyjde úplná v nejbližších dnech, učí se již v kursech pořádaných

v **Praze**: *Svaz Českých Esperantistů* (česká technika), *Klub Esperantistů*: obchodnický kurs, dámský kurs, *Akademia Klubo*, *Studenta Rondeto*, *Praha VIII.*, v **Plzni, na Žižkově**, v **Kolíně nad L.**, v **Ústí nad O.**, v **Č. Budějovicích**, v **Ml. Boleslavi**, v **Hořovicích**, v **Písku**, v **Hradci Král.**, v **Trutnově**, v **Komárově**, v **Libochovicích**, v **Hostomicích**. v **Lysé nad L.**, v **Přerově** a v několika městech v **Americe**

KORESPONDANTOJ. Ilustr. poŝtkartojn interŝanĝas: *24. S-o Lucien Duthoit, 24. Route de Roubaix. *Mons en Baroeul*, France-Nord. — *25. S-o Johano Grangette, 38. rue des Deux-Amis, *St. Etienne*, France-Loire. — *26. S-o E. Allard, 6 b rue du chemin de fer, *Lille*, France. — *27. F-ino Magdeleine Marcattin, 96. rue St. Vulfran. *Abbeville*, France. — *28. F-ino Mary Hélène Bertrand, 20. rue Jeanne Hachette, *Le Hâvre*, France. — *29. S-o Mashall Whitte, 224. Water Street, *Evansville*, Indiana, U. S. A. — *30. S-o Milutino P. Velimirović, instruisto, *Danilovgrad*. Montenegro. — *31. S-o Panneton, 144 rue de Paris. *Auxerre*, France. — *32. S-o Alfonso Chevallier, 63. Route de Ruondin, *Le Mans*, France. — *33. S-o Marcel Larivière, cité de Clercq 34. Hénin-Liétard. France (P. de C.). — *34. S-ino Lecomte. rue St Martin, *Romorantin*, France (L. & Ch.). — *35. S-o Maurice Paul. 12. rue Desfriches. *Orléans*-Loiret, France. — *36. S-o Laurits Nielsen. Danmarksgade 9. I. *Odense*, Danmark. — *37. S-o Louis Collet, 31. rue de la Claire, *Lyon-Rhône*, France. — *38. S-o Marcell Rullier. 17. rue de Montaud. *St Etienne*, France. — *39. S-o Oscar Olsson. „Folkets Hus" *Landskrona*. Svedujo. — *40. S-o Létang. 227. rue de la Plaine, *Boulogne sur Seine*, France (dez. kor. kun Bohemoj per leteroj). — *41. S-o Th. Desbrosses, prof. de gimnazio. *Montargis*, France (interŝanĝas il. kartojn kaj poŝtmarkojn). — *42. S-o Pastro J. Ŝirjaev, St. Roždestveno. gub. Jaroslav, Rusujo (poŝtmarkojn). *43. S-o Savo Savov, komercisto en *Vraca*. str. Voznisenska. 11. Bulgarujo (dez. korep. kaj interŝanĝi p. m. neeŭropajn. Ĉiam tuj resp.). — *44. S-o José Julià, Barcelona. Sabadel 46. via Marague, *Hispanujo*.

Korekto: En lasta numero surprizis nin kaj certe ankaŭ niajn legantojn preseraro kaŭzita de esperanta koboldo kompostista: en artikolo „Same kiel la homoj" oni legu „alno" anstataŭ „ulno".

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de K. Pitter, Praha.